

ESPERANTO **EN KASSEL**



SALUTON!

Esperanto estas neŭtrala internacia kaj transkultura dua lingvo por ĉiuj. Ĝia aplikado servas al la paca kaj solidara interkompreniĝado de homoj kun diversaj lingvoj kaj kulturoj sur nia unu komuna Planedo.

Esperanto estas artefarita lingvo en la senco kiel aŭtomobilo estas artefarita ĉevalo – artefarita, sed funkcipova...

Esperanto mondvaste flue parolatas kaj uzatas de ĉirkaŭ 200.000 homoj. Esperanto intertempe aĝas 130 jarojn kaj prezentatas en pli ol 120 nacioj kun propraj organizaĵoj. Aktuale ĝi aparte disvastiĝas en Azio, Afriko kaj la interreto, kie estas ofertataj multaj informoj kaj lingvokursoj. Mondvaste estas granda nombro da internaciaj renkontiĝoj kun Esperanto kiel komuna lingvo. La **UNESKO** agnoskis per du rezolucioj la valoron de Esperanto por la internacia intelekta interŝanĝado, la alproksimiĝo de la popoloj kaj por la propraj celoj kaj idealoj. La duonjara "Kuriero" de UNESKO aperas ankaŭ en Esperanto. La Universala Esperanto-Asocio havas konsultajn rilatojn al la UN.

Kiel komuna kompetenta lingvo por ĉiuj Esperanto **integras**, ne estas apartigo pro diferencaj lingvoj. Sence de **demokratia du-**

lingveco Esperanto progresigas egalecon kaj justecon inter la nacioj de diversaj etnaj lingvoj kaj kulturaj valoroj. Neniu havas avantaĝon pro sia gepatara lingvo. Kaj ĝi zorgas pri **ekologie daŭripova komunikado**. Ekz. en la EU je la nuntempa lingvopolitiko estas pli ol 500 tradukdirektoj, kiuj devas esti priservataj. Per Esperanto estus 24! Kaj per tiaj bazaj trajtoj Esperanto sin apogas tre strikte al la tri gvidprincipoj de la UN – **Paco, Homaj Rajtoj kaj Daŭripova Evoluigo**.

Esperanto kiel lingvo havas tri esencajn karakterizilojn: **logika, neŭtrala, simpla**. La lerninvestoj por ĉi komunikilo estas nur kvinono de tiu por etna lingvo.

Kassel ja havas kelkajn rilatopunktojn al Esperanto. Estis ĉi tie aktivecoj de la Laborista Esperanto-Movado, de la Esperantaj Fervojistoj, en la Junularkastelo Sensenstein estis internaciaj Esperanto-Festivaloj kaj en la jaro 1984 okazis la Germana Esperanto-Kongreso en Kassel. La originaloj de la Esperanto-traduko de la fabeloj de la Fratoj Grimm efektive ja troviĝas en la Germana Nacia Biblioteko en Berlino.

Ekde la 1970-aj jaroj ekzistas la Esperanto-Rondo Kassel kun proksimume 10 aktivaj esperantoparolantoj en kaj ĉirkaŭ la urbo. Ili



regule renkontiĝas ankaŭ kun samideanoj el Germanio kaj la cetera mondo. Kaj en 6 de la 9 ĝemelaj urboj de Kassel ekzistas Esperanto-grupoj.

La **Esperanto-Rondo Kassel** estas organizata en la Kulturinitiative Harleshausen e.V. – KIH (www.kih-kassel.de).

La Rondo kutime rekontiĝas **ĉiuĵaŭde ekde la 18:00 horo en la salono de la KIH (vd supre) je la Ossenplatz en Harleshausen, Karlshafener Str. 2.**

Interesataj estas kore invitataj kunagadi en la Rondo. Antaŭ unua vuzito bv. kontakti nin telefone, ĉar kelkfoje la renkontiĝo okazas en alia loko.

Kontakto:

Wolfgang Günther
Wilhelmshöher Weg 11
34128 Kassel
T.: 0561 – 921 982 02
Retpoŝto: w.guenther.esperanto@web.de
2018